

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO


Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

januaro / februaro 1993



***Unuiĝinta GEFA
plenvaporo al estonteco***

1993 - denove unueca GEFA

Okazis en oktobro 1910, ke germanaj fervojistoj fondis "Germana Esperanta Fervojista Asocio". Ĝi trastaris du mondmilitojn, inflaciojn, diktaturon, persekutojn, malvarman militon, socialismon, la ekonomian miraklon kaj ankaŭ la jardekojn da disbatiteco.

Fine venis nun la tempo de reunuiĝo. Kiel ni jam anoncis en Bulteno 5/92, la fervojistaj esperantistoj de ambaŭ germanaj fervojoj DB kaj DR ekde 1.1.1993 komune membriĝas en unu asocio kun la tradicia nomo GEFA, germane "Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten". Unuiĝis ankaŭ la organo de ambaŭ grupoj, "Bulteno", eldonita sub aŭspicioj de Bundesbahn-Sozialwerk, Hauptvorstand. Tiamaniere ĉiuj germanaj Esperanto-fervojistoj denove havas unuecan asocian organon, kiel ili havis ĝin jam antaŭ 80 jaroj.

Agrablajn restadon kaj senton en la unueca asocio la estraro deziras al ĉiuj novaj kaj malnovaj membroj. Estas komplikaj cirkonstancoj, kiuj akompanas tiun unuiĝon. Tre klare karakterizas ilin la ĝisnuna prezidanto de la Fakgrupo Fervojistaj Esperantistoj de DR, Achim Meinel, en la lasta numero de "Fervojistaj Novaĵoj" per la vortoj "antaŭ-emeritiĝo, monmanko, ŝanĝoj de loĝkoj, novaj labormetodoj ktp". Sed ankaŭ la kolegoj de DB jam de jaroj suferas por daŭra raciigado kun ĉiuj ĝiaj malagrablegaj sekvoj kaj ĝuste nun por kompleta necerteco pri estonteco kaj laborkondiĉoj en la privatigota fervojo. Estas memkompreneble, ke sub tiaj kondiĉoj kultura asocio kiel la nia neniel renkontas favoran situacion por evoluiĝi, kvankam ankaŭ la aliaj kulturaj sekcioj de BSW rimarkas la akran venton.

Certe estas necese, priskribi precipe por la novaj membroj la organiza formon de GEFA, kiu havas alian bazon ol kutime en kluboj kaj sekcioj. Jam ĉiam ĉe DB ekzistas Sociala Organizo BSW, kies ĉefestraro havas sian sidejon en Frankfurt (Main) (Bundesbahn-Sozialwerk, Hauptvorstand). En ĉiu fervoja direkcio analoge troviĝas distrikt-estraro (Bezirksvorstand). En la kadro de tiu BSW ĉiuj fervojistoj kaj emerituloj havas eblecon, aliĝi al liber-tempa kultura sekcio, el kiuj ekzistas ĉirkaŭ dekduo, ekz. ĥoroj, orkestroj, radioamatoroj,

filatelistoj, filmistoj, fotografistoj kaj ankaŭ ni, la esperantistoj.

La agado de ĉiuj grupoj okazas laŭ la laborregularo de BSW. Tio signifas, ke la prezidanto de ĉiu sekcio, do ankaŭ de GEFA, laŭ propono flanke de la sekcio estas agnoskata kaj konfirmata (berufen) kiel ĉefkomisiito de la BSW-ĉefestraro. Dum la tuta tempo de sia laborperiodo li estas persone respondeca al BSW. Li laboras honorofice kiel ĉiuj kunlaborantoj de tiuj libertempaj grupoj (germ. Hauptbeauftragter). Por havi subtenadon, li rajtas proponi du aŭ tri kunlaborantojn, kiujn konfirmas ankaŭ la BSW-ĉefestraro. Tiu grupeto nomiĝas laborkomunumo (Arbeitsauschuß). Rilate al aliaj Esperanto-organizoj ĝi estas la estraro.

Ekde 1.1.1993 tiu laborkomunumo konsistas el jenaj personoj: Joachim Giessner, prezidanto, redaktoro, ĝeneralaĵoj, Otto Rösemann, vicprez., protokoloj, parte sekr. laboroj, Hans-J. Riehn, administrado de la financrimedoj, spec. taskoj, Achim Meinel, amaskomunikiloj, spec. taskoj.

En ĉiu direkcia distrikto analoge estas konfirmita distrikt-komisiito. Krome ekzistas kelkaj komisiitoj por specialaj taskoj (instruado, faka lingvo, emerituloj ktp). Do ne ekzistas kutimaj elektoj. Ĉiuj funkciuloj kunvenas minimume unu fojon jare en oktobro okaze de la oficiala jarkunveno, kiu ĉiujare estas aranĝita en alia distrikto. Kutime okazas dua printempa laborkunsido de la laborkomunumo kun la komisiitoj.

La organo de GEFA nomiĝas "Bulteno". Ĝi aperas kvinfoje jare (komp. "40 jarojn Bulteno").

GEFA estas landa asocio de IFEF kaj partoprenas laŭeble konstrue en ties agado. Laŭ la IFEF-statuto kaj laŭ sia membronombro GEFA estas reprezentata en la IFEF-komitato per tri komitatanoj (Giessner, Rösemann, Jasmann).

La organizformo ĉe DR estas sama. Ekzistas Bahn-Sozialwerk, kies ĉefestraro troviĝas en Berlin. Ĝi laboras laŭ simila maniero, do por

ĉiu el la ses direktoj laŭ ebleco nomumas distrikt-komisiiton. Tio ĝis nun okazis por Berlin, Dresden kaj Halle. Ĉefkomisiito kaj laborkomunumo estas kompetentaj ankaŭ por BSW-DR.

La jara baza kotizo por GEFA-anoj estas 12 DM, el kiuj IFEF ricevas kontraŭvaloron de ses svisaj frankoj. Ĉiu GEFA-ano aŭtomate estas membro de IFEF kaj ricevas "Bulteno" kaj "Internacia Fervojisto". Ankaŭ familianoj kaj ĝis certa grado nefervojistoj estas bonvenaj kiel membroj. Sed membroj, kiuj ne pagas la tre modestan regulan kotizon por BSW (Spender), pagu iom pli altan kotizon al GEFA.

Fine ni menciuj, ke GEFA estas faka sekcio de Germana Esperanto-Asocio kaj kun voĉdonrajto reprezentata en ties konsilantaro (Verbandsrat).

Giessner

40 Jahre Bulteno

Es geschah im Oktober 1952, als "Bulteno" das Licht der Welt erblickte. Der erste in der langen Reihe der Redakteure war Adolf Simon, Kaiserslautern. Diese erste Nummer wurde der Grundstein für das seitdem ununterbrochen fortgeführte Bindeglied zwischen der Vereinigung und ihren Mitgliedern. Seine wesentlichen Aufgaben sind

- Unterrichtung über bevorstehende Veranstaltungen national und international,
- Berichterstattung über GEFA und IFEF,
- Pflege der Fachsprache.

An dieser Stelle sei betont, daß das regelmäßige Erscheinen in diesen 40 Jahren und in dieser Form dem Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks zu danken ist. Lange Zeit kamen alljährlich 6 Nummern mit durchschnittlich 4 Seiten heraus. Die ersten 10 Nummern erschienen bei der Graphischen Anstalt Scheu in Kaiserslautern, aber schon die 11. Nummer wurde im Februar 1954 bei der Limburger Vereinsdruckerei gedruckt. Im selben Jahr übernahm Joachim Giessner, Braunschweig, die Redaktion.

Anfangs erschien das Bulteno ausschließlich in Esperanto. Bald zeigte es sich aber,

daß wichtige Mitteilungen auch in Deutsch veröffentlicht werden mußten. Diese Zweisprachigkeit wurde als praktisch erkannt und bis heute beibehalten.

1957 übernahm Paul Steinig, Bremen, die Redaktion bis 1960. In 1959 wurde die jährliche Seitenzahl von 24 auf 32 erhöht. Seitdem erscheinen auch Bilder.

1961 war ein neuer Redaktionswechsel fällig, Gerd Korth, Frankfurt, führte das Amt für ein Jahr. Die jährliche Seitenzahl konnte auf 40 erhöht werden, so daß eine bessere Berichterstattung gewährleistet wurde. Das war sehr wesentlich, da die Aufgaben von GEFA sich damals beträchtlich ausweiteten.

Von 1961 bis Ende 1966 hatte Willi Barnickel, Frankfurt, das Amt des Redakteurs inne. In dieser Zeit wurde der Kopf der Titelseite modernisiert und trägt seitdem das BSW-Zeichen.

Anfang 1967 übernahm Willi Graß, Solingen/Lichtenfels, die Redaktion für die lange Zeit von 25 Jahren. Vom selben Jahr an wurde das Bulteno in der Fränkischen Verlagsanstalt in Nürnberg hergestellt.

Die wirtschaftliche Entwicklung in den siebziger Jahren ließ auch das BSW und damit das Bulteno nicht ungeschoren. Obwohl 1974 die preiswert arbeitende Druckerei Friedrichs in Herzberg am Harz den Druck übernahm, konnten nur noch 5 Nummern jährlich erscheinen, und die Gesamtseitenzahl wurde auf 36 reduziert. Einzelne Sondernummern waren trotzdem möglich. Hier sind besonders die 1980 und 1985 herausgegebenen Jubiläumsausgaben (70 bzw. 75 Jahre GEFA) zu erwähnen. Infolge Todesfalls in der Druckerei Friedrichs wurde der Druck 1991 von d.m-druck in Bremen übernommen.

Bleibt zum Schluß der letzte Redakteurwechsel zu erwähnen, der mit dieser Nummer in Kraft tritt. Es grüßt Sie alle Ihr nicht ganz unbekannter Joachim Giessner als neuer Redakteur und bittet Sie herzlich, Ihr GEFA-Mitteilungsblatt "Bulteno" nicht nur

aufmerksam zu lesen, sondern der Redaktion auch Beiträge aus dem Esperanto-Geschehen der Eisenbahner und aus der Welt der Eisenbahn zu senden. Keine Angst vor sprachlichen Unvollkommenheiten! Sie werden ausgebügelt. Der Redaktionsschluß der folgenden Nummer ist jeweils am Schluß der laufenden Nummer zu finden.

Wünschen wir dem Bulteno alles Gute für das fünfte Jahrzehnt!

GEFA

Fervojaj novaĵoj

Belgio

La vartransportfirmao Intercontainer ofertas de post septembro 1992 rapidtransportojn inter la kontenera terminalo en Antwerpen kaj certaj francaj centroj. En la direkto nordosudo la vartransporto daŭras maksimume 24 horojn, kontraŭdirekte necesas 36 horojn. Estas uzataj vartrajnoj de la kombinita trafiko kun trajnanonca kaj rezervada sistemo.

Britio

La submara fervojtrafiko tra la tunelo inter Francio kaj Britio komenciĝos en aŭtuno 1993. Laŭ deziro de la koncerna tunelkompanio cirkulos antaŭe malplenaj fantomtrajnoj minimume dum ses monatoj por certigi, ke poste ne okazos komplikaĵoj.

Ĉinio

Ĝis la jaro 2000 la ĉina fervojreto de nuntempe 52 000 km estos pligrandigita je 18 000 km. El tiu 29 procentoj estos elektrizitaj kaj 36 procentoj dutrakaj.

Danlando

Danajn Ŝtatajn Fervojojn (DSB) atendas nova organizformo. DSB intencas starigi tri memstarajn branĉojn: pasaĝertrafiko, vartrafiko kaj infrastrukturo. Imagebla estas transformo de la branĉo vartrafiko en akcian kompanion. Tio povus efektiviĝi ankaŭ por la trafiko per pramŝipoj kaj aŭtobusoj krome por vojaĝagentejoj.

Germanio

Germana Federacia Fervojo (DB) adjudikis la konstruadon de 60 novaj grandrapidaj traj-

noj. Tiu nova tipo ICE 2 konsistas el elektra trakciilo, du vagonoj de la 1a klaso, tri de la 2a klaso kaj unu tia kun kondukistejo. Tia duontrajno povos esti kuplata kun normallonga ICE, sed servos ankaŭ por reduktata pasaĝernombro.

Hindio

La etŝpura parto (6 000 km) de la hinda fervojreto estos ŝanĝkonstruata dum la venontaj kvin jaroj kiel normalŝpura (1 435 mm). Ĝis fino de 1993 estos pretaj 835 km.

Rusio

Rusaj Ŝtataj Fervojoj troviĝas en financa krizo pro la regresanta industrio. Vagonoj estas priarabataj. Nepre necesas modernigado. Estas projektite transformi la fervojojn en akcian kompanion.

Turkio

Denove aktuala estas la novkonstruo de submara tunelo, kiu ebligos rektan fervojlinion inter Eŭropo kaj Malgrandazio. Kaze de realiĝo la veturdaŭro de trajnoj inter la turkaj metropoloj Istanbul kaj Ankara konsiderinde reduktiĝus.

Kompil. el DB-organoj 1992 de W. B.

Seniorentreffen

Das diesjährige Seniorentreffen wird am Donnerstag, dem 22. April 1993 ab 10.00 Uhr in Duisburg, dieses Mal unter meiner Regie stattfinden. Tagungsort ist das Hotel "Zum Alten Fritz", Koloniestraße, etwa 300 m vom Ostausgang des Hbf entfernt. Dort wird uns ein sehr gemütlicher Raum zur Verfügung stehen.

Alle unsere nicht mehr aktiven Mitglieder und deren Angehörige sind hiermit herzlich eingeladen, an dieser Veranstaltung teilzunehmen, die wie immer Gelegenheit bieten wird zu frohem Wiedersehen und Plaudern. Eine besondere Einladung ergeht nicht. Aber bitte senden Sie bis zum 10. 4. eine Postkarte an mich als Anmeldung an folgende Anschrift:

Rolf Terjung, Finkenschlag 68, 4100 Duisburg 26, Bissingheim.

Rolf Terjung

Aus den Gruppen

Bonn

Am 17. 12. 1992 organisierte der Bezirksbeauftragte von Köln, Herlitze, eine Senioren-Weihnachtsfeier der GdED-Ortsverwaltung mit 80 Teilnehmern. Dabei fügte er mit großem Erfolg eine weihnachtliche Tiergeschichten in Esperanto und Deutsch ins Programm ein. Zwei Tage später las er in der evangelischen Kirche vor dem Männerkreis der Senioren die Weihnachtsgeschichte aus dem Lukas-Evangelium im Esperantotext, was zu einer lebhaften Diskussion Anlaß gab.

Bremen

Aus Argentinien kam C. Rojas und hielt einen aufschlußreichen Vortrag über sein Land, die dortigen Lebensverhältnisse und die Lage der Bevölkerung. Am 16. 12. hielt die Gruppe ihre alljährliche Zamenhoffeier ab.

Herzberg am Harz

Mitglieder der Gruppe Herzberg nahmen am 16. 12. an einer Weihnachtsfeier in Leinefelde teil, wo Esperantisten aus dem Eichsfeld (ehem. DDR) und dem Südharz zum ersten Male gemeinsam feierten.

Duisburg

Eisenbahner-Esperantisten aus den Bezirken Köln und Essen, zusammen mit Esperantisten der "Rheinisch-Westfälischen Esperanto-Liga", feierten das traditionelle "Zamenhoffest" diesmal in Duisburg. Organisiert wurde alles von Rolf Terjung, dem Beauftragten für Esperanto im BSW-Bezirk Essen. Erhard Herlitze, Beauftragter für Esperanto im BSW-Bezirk Köln, führte als Moderator durch das Programm.

Achtzig Personen genossen bei Kaffee und Kuchen im schönen Restaurant der Mercatorhalle ein ansprechendes Programm, wobei aber noch genügend Zeit zum Plaudern blieb.

Professor Ferdinand Bruckmann erfreute die Zuhörer durch volkstümliche, klassische Klaviermusik. Unter Leitung von Marianne

Frank sang sich der Seniorensingkreis St. Ludger mit Liedern in Esperanto in die Herzen der Zuhörer. Otto Nitsche, Duisburg, hielt einen Vortrag über seine interessante Reise nach China und zeigte dabei ungewöhnliche Lichtbilder. Wie entsteht eine Graphik? Tamara Koszak aus Polen konnte dies anhand von Lichtbildern erklären. Natürlich auch in Esperanto.

Rolf Terjung

Münster

Trifoje 40

Nia membro Guido Brandenburg, filo de Margret kaj Willi Brandenburg, denaska esperantisto, fariĝis 40 jarojn, festis 40an Esperanto-jubileon, ricevis medalon de Germana Esperanto-Asocio por 40jara membreco GEFA kore gratulas!

Aachen

Kiel novan membron ni bonvenigas Karl-Josef Kupper en Aachen. Li utiligas al si la telekurson.

Ni funebras

La 4an de oktobro 1992 mortis en aĝo de 82 jaroj **Fritz Jentsch**, fidela membro de grupo Weiden, esperantisto ekde 1930. Sincere ni kondolencas al la familanoj.

La 26 an de oktobro 1992 mortis **Alois Hans**, 64 jarojn aĝa. Li estis membro de GEFA dum 35 jaroj. De 1967 ĝis 1970 li estis distriktkomisiito en tiama direkto Mainz. Li organizis la jarkunvenon 1968 en Neustadt (Weinstraße). Antaŭ dek jaroj li blindiĝis, sed tamen vizitis kelkajn kunvenojn kaj kongresojn kun helpo de sia edzino. Kun danko GEFA memoras lian helpemon kaj modestecon. Ni sincere kondolencas.

En oktobro krome mortis **Kurt Fiedler**, Duisburg, 74 jarojn.

La venonta 37a jarkunveno

okazos 8. – 10. 10. 1993 en Titisee (Nigra Arbaro). Detaloj kaj aliĝilo en Bulteno 2/93.

Die 37. Jahresversammlung wird vom 8. bis 10. Oktober in Titisee stattfinden. Einzelheiten im Bulteno 2/93.

Deutscher Esperanto-Kongreß 1993 in Karlovy Vary

Der 71. Deutsche Esperanto-Kongreß wird über Pfingsten 1993 in Karlovy Vary (Karlsbad) stattfinden. Darauf einigten sich Vertreter des Deutschen und des Tschechischen Esperanto-Bundes im Rahmen des 70. Deutschen Esperanto-Kongresses. Der gemeinsame Kongreß soll die freundschaftlichen Kontakte zwischen den Esperanto-Sprechern aus den beiden Ländern vertiefen und die Vorteile der Internationalen Sprache unter Beweis stellen.

Esperanto an deutschen Universitäten

Die internationale Sprache Esperanto wird auch im wissenschaftlichen Bereich immer mehr ernst genommen. So bieten im jetzigen Wintersemester 1992/93 die Universitäten Berlin, Frankfurt, Hamburg, Karlsruhe, Paderborn und Tübingen Lehrveranstaltungen über Esperanto an. Weltweit führend im Esperanto-Unterricht an Hochschulen ist allerdings die Volksrepublik China. Dort bieten zur Zeit mehr als 20 Universitäten Esperanto-Sprachkurse an.

Alles Bahnhof

Leider etwas zu spät erreichte uns ein Ausschnitt aus dem "Münchner Merkur", der

aber sicherlich auch jetzt noch – da weiterhin aktuell – einer näheren Betrachtung und Beurteilung wert ist:

Die Münchener dürfen sich freuen. Vom 5. bis zum 7. Oktober stehen ihnen im Holzkirchener Bahnhof jede Menge Performances und Kunstevents bevor, die ihnen der "Red Train" nach Bayern bringt. So steht es in einer Presse-Information der Bundesbahndirektion München. Das sagt Ihnen nichts, Sie verstehen nur Bahnhof bei diesem Bundesbahn-Deutsch? Dann sei zum besseren Verständnis das komplette Programm angekündigt. "Distinguished Visitors", heißt es und ist, das muß schließlich gesagt werden, ein "polymediales Redwork-Network-Projekt". Karten dafür kann man bei der "Red Train Hotline Ticket-Reservierung" bekommen.

Ein netter Zug der Bundesbahn, daß sie die englische Sprache so pflegt. Dennoch sei ganz vorsichtig gefragt: Was ist denn ein "polymediales Redwork-Network-Projekt"? Wenn der zahlende Gast nun rot sieht, weil er nicht hellsehen kann, muß man für den Erfolg der Werbeaktion schwarz sehen.

Ŝerco pripensinda: Judo venas al sia rabeno kaj plendas:

"Rabbi, io terura okazis. Mia filo intencas edziĝi kun kristanino".

"Via filo", respondas la rabeno. "Vidu min kaj mian filon! Mi estas la majstro de la komunumo. Ĉiuj admire rigardas min kaj mian familion, vidas en mi modelon. Kaj mia filo ankaŭ volas edziĝi kun kristanino kaj baptigi sin".

La judo momenton silentas kaj poste diras:

"Ĉiuj venas al vi kun siaj zorgoj. Sed kion **vi** faras, kiam vi havas tian teruran problemon? Al kiu vi turnas vin?"

"Nu, kion mi faru? Mi turnis min al Dio".

"Kaj kion Dio diris?"

"Dio diris al mi: "Via filo... rigardu la mian!"

**Estraro kaj komisiitoj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojo
Stato: januaro 1993**

Estraro

Prezidanto/Redaktoro:

BAR a. D. Joachim Giessner, An der Nicolaischule 3, W-3420 Herzberg/Harz,
tel. kaj fax 0 55 21/45 86;
EDS: Bf 3420 Herzberg (Harz)

Vicprezidanto: Otto Rösemann

Ringstraße 14 D, W-3067 Lindhorst
tel. 0 57 25/79 92
EDS: Betr.St. 3060 Stadthagen

Sekretario: BHS a. D. H. J. Riehn,
Betr.St. Bf 68/6700 Ludwigshafen (Rh) Hbf
Priv.: Richard-Dehmel-Str. 3, W-6700 Lud-
wigshafen/Rhein, tel. 06 21/58 24 43

Achim Meinel

Zentrale DR, Hauptverwaltung
Hauptabt. Innere Revision
Ruschestraße 59, O-1130 Berlin,
Basa 99/5 53 27
Priv.: Platz d. Vereinten Nationen 31
O-1017 Berlin, tel. 0 30/4 27 23 95

Distriktaj komisiitoj:

Essen: Rolf Terjung, Finkenschlag 68,
W-4100 Duisburg 26, tel. 02 03/72 40 95
EDS ne urĝa
Fka-Betr.St./4100 Duisburg Hbf

Frankfurt/Main: BAR a. D. Egon Kiefer,
Erthalstraße 6, W-8770 Lohr/Main,
tel. 0 93 52/67 07
EDS an Bf 877 Lohr Bahnhof z. Hd. H. Kiefer

Hamburg: BHS Klaus Böhnke,
Bf 2400 Lübeck Hbf, Basa 947/862/374

Hannover: BBI a. D. Werner Heimlich,
Fröbelstraße 4, W-3040 Soltau,
tel. 0 51 91/52 13
EDS Bf 3040 Soltau/H.

Karlsruhe: BOS Karl Bernhard,
Bf 6800 Mannheim/Rbf.
Priv.: Sauerbruchstraße 8, W-6700 Ludwigs-
hafen (Rh), tel. 06 21/51 07 82

Köln: BAmtm. a. D. E. Herlitzé,
Prof.-Neu-Allee 32, W-5300 Bonn 3,
tel. 02 28/46 28 82,
EDS: Betr.St. Fka 5300 Bonn Hbf

München: Klemens Lenz,
Sedlmayrstraße 20, W-8000 München,
tel. 0 89/16 98 58

Nürnberg: TBAmtn Reinhard Stoll, B 8004,
BD 8500 Nürnberg, Basa 966/2671
Priv.: Sudetenstraße 4, W-8542 Roth

Saarbrücken: BBI a. D. Alois Haupenthal,
Brennender-Berg-Straße 28, W-6603 Sulz-
bach/Saar, tel. 0 68 97/38 56
EDS: Betr.St 6600 Fka Saarbrücken Hbf

Stuttgart: TBOAR Siegfried Krüger,
BD Stuttgart, MW 0013, Basa 952/3125

Specialaj komisiitoj

Kasisto: BOS Karl Bernhard, vidu Karlsruhe

Fakterminaro: LBI a. D. Dieter Hartig,
Kasseler Straße 76, W-2800 Bremen 1,
tel. 04 21/35 33 39, EDS: Bezk. 2800 Bremen

Lingvaj ekzamenoj kaj instruado:
BOAR a. D. Fritz Lautenbach, Abtstor 21,
W-6400 Fulda, tel. 06 61/7 76 27,
EDS: Esperanto-Gruppe, 6400 Fulda

Bulteno-dissendo:

BBI a. D. Werner Heimlich, vidu Hannover

Emerituloj: Rolf Terjung, vidu Essen

Arkivo: H. J. Riehn, vidu Sekretario

Jarraportoj:

Otto Rösemann, vidu Vicprezidanto

Peto al la eksterlandaj geamikoj! Jen ni komunikas la aktualan adresaron de la GEFA-estraro kaj de la komisiitoj. Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii la akuratan akcepton.

ESPERANTO-FERNKURSE

I

ESPERANTO · EINE LEBENDIGE SPRACHE

EINFÜHRUNGSKURSUS

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 7 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

KOSTEN: 30.- DM

GEFA

II

FORTBILDUNGSKURSUS

KONVERSACIA KURSO

**Viele Situationen
des täglichen Lebens
werden als
Gesprächsstoff behandelt.**

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

KOSTEN: 40.- DM

- leicht und bequem daheim lernen -

MIT DIESEN LEHRGÄNGEN WERDEN SIE FLÜSSIG SPRECHEN

**ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN, IST EIN ERLEBNIS
GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!**

Bestellen Sie bei: Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten,
Herrn Karl Bernhard, Sauerbruchstraße 8, W-6700 Ludwigshafen
Lieferung nach Zahlungseingang auf:
Konto 953 729 bei Sparda-Bank Frankfurt (M), BLZ 500 905 00

Redaktfino por n-ro 2/93 estas la 10. 4. 93

Herausgeber/eldonanto:

Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main)

Schriftleitung/redakcio:

Joachim Giessner, An der Nicolaischule 3, W-3420 Herzberg/Harz

Druck/preso:

d.m-druck gmbh, Holsteiner Straße 80, W-2800 Bremen 1, Telefon 04 21 / 39 13 73